Redakta noto

Kiom da ISAE-anoj vere legas nian asocian organon? Laŭ miaj kaŝaj enketoj ne tre multaj. La fidelaj legantoj tamen certe interesiĝas pri la ĉi-jara ISAE-jarkunveno kadre de la UK en Vilno, kiun protokolis d-ro *Vergara*, Landa Delegito de ISAE en Ĉilio, jene:

- post malfermo de la jarkunveno je la 28-a de julio 2005, 9h00, la prezidanto konstatas, ke ISAE fondiĝis en 1906 kaj sekve festos la centjariĝon sekvontjare (2006-07-24/28) per scienca konferenco en *Tavoleto* / Italujo, do en la semajno ĝuste antaŭ la 91-aUK en Florenco;
- SR publikigas artikolojn en Eo precipe por daŭre pludisvolvi la uzon de la internacia lingvo pri sciencaj temoj; ISAE mem, kun nuntempe ĉ. 150 membroj, plejparte konsistas ne el profesiaj sciencistoj sed el interesatoj pri sciencaj aferoj el diversaj fakkampoj, kiuj konvinkiĝis pri la graveco de la sciencpublikiga utiligo de Esperanto;
- prof. *Wandel* salutas nome de la UEA-estraro kaj substrekas la gravecon de ISAE kiel scienca fakasocio kadre de UEA; d-ro *Ferency* salutas kaj transdonas amikecan diplomon de UMEA al ISAE, tiel akcentanta la valoron de fakasocia kunlaboro;
- la prezidanto denove instigas al verkado de artikoloj por SR. Por sia pluekzistado ISAE bezonas nek mondonacojn nek patronecojn, sed ja la legadon de kaj la aŭtoradon por Scienca Revuo;
- post la komuniko fare de la prezidanto pri la fino de la trijara estrarperiodo 2003-2005 kaj necesa laŭstatuta novelekto de estraro kaj prezidanto por la periodo 2006-2008, d-ro *Vergara* proponas elekti aklame la nunan prezidanton por plua prezidanteco, kion oni aplaŭde kaj grandnombre subtenas; li plue emfazas reklami por ISAE cele de konigado de nia asocio al pli multaj esperantistoj kaj sciencamantoj; s-ro *Sly* kontentas pri la neeliteco de ISAE kaj devigas sin, estonte pli aktive propagande informi ĉe sialandaj Eo-organizaĵoj.
- malgraŭ la fiera nombro de 57 ĉeestantoj nur 3 ISAE-estraranoj partoprenis la jarkunvenon (prezidanto, ISAE-komitatano A ĉe UEA kaj 1 Landa Delegito): tio ne sufiĉis por kunvoki laŭstatutan kaj decidpovan estrarkunsidon;
- la membrokotizo restas la sama kiel en la antaŭaj jaroj (€ 20,00), sed estonte pagenda sole al la konto isae-z ĉe UEA (la germanuja poŝtbanka ISAE-konto estas nuligita) aŭ la landa peranto de ISAE;
- la prezidanto fermas la ISAE-jarkunvenon 2005 je 10h30.

Konstanta stato kiel lingvoscio ĉe *Chomsky* : ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma?

Hiroshi NAGATA

Resumo

En la genera gramatiko de *Chomsky*, la fina konstanta stato (Ss) kiel lingvoscio estas plej ofte komprenata kiel stabila kaj unuforma. La fakto tamen estas, ke en 1979 *Chomsky* akceptis nestabilan kaj neunuforman aspekton de Ss. Tiu ĉi artikolo diskutas implicojn de la fakto, rilatigante ĝin al lia tezo de denaskismo pri lingvoakiro, kaj sugestas, ke la fakto malfortigas la tezon.

Enkonduko

La stato de lingvoscio en la genera gramatiko de *Chomsky* (en la sekva teksto "Ĉomsko" konforme al la Esperanta ortografio, escepte dum referencado) koncernas la staton, kiun ĉiuj infanoj normalaj atingas post kelktempa elmetiĝo al sia gepatra lingvo. Tiun ĉi staton *Chomsky* (1980, p.37) unue karakterizis kiel "konstanta stato" (angle *steady state*: Ss), kiun universale determinita "komenca stato" (angle *initial state*: So) fine atingas, trapasinte statojn S1, S2, ... inter So kaj Ss.

Ss, laŭ lia teorio, estas ĝuste la stato kiun, unuflanke, ĉiuj normalaj homoj atingas unuforme kaj kiun, aliflanke, priskribas lia genera gramatiko. Kiam Ĉomsko menciis tiun ĉi staton, li aldonis certan rezervon pri la stabileco de Ss, nome ke Ss ŝanĝeblas, sed nur periferie pro la aldono de novaj vortoj (*Chomsky* 1980, 1986). Lia karakterizado de Ss do implicas, ke neniom da ŝanĝoj okazas je la fundamento de gramatiko (pli precize, je tiu de sintakso) se Ss estas unu fojon atingita. Tamen, ĉu Ĉomsko

estadis tutplene konsekvenca rilate al la naturo de Ss? Tiu ĉi artikolo, kontraŭe al ordinara interpreto, respondas negative al tiu ĉi demando kaj montras, ke Ĉomsko efektive akceptis nestabilecon de Ss eĉ pri sintaksaj aspektoj de la gramatiko. Ĝi tiele sugestas, ke, se tiu ĉi fakto estus unu fojon konsiderita, la Ĉomska denaskismo pri lingvoakiro perdus sian forton multe pli ol alie.

Ekzistas individuaj diferencoj inter Ss-oj posedataj de denaskaj parolantoj

Surpriza estas la fakto, ke jam antaŭ 25 jaroj Ĉomsko ĉe la Centro *Royaumont* por scienco de l' homo (*Centre Royaumont pour une science de l'homme*) menciis en tiea diskuto, ke "la konstanta stato iom malsamas inter homoj malsamaj je edukiteco" (*Piattelli-Palmarini*, 1979, p.261).[1] Unu problemo tuj staras pri tiu ĉi mencio, nome: kiom da gradoj li intencas per la adverbo "iom"? Originalaj ekvivalentoj por "iom" estas "*passablement*" en la franca (*Piattelli-Palmarini*, 1979, p.261) kaj "*rather*" en la angla lingvoj (*Piattelli-Palmarini*, 1980, p.175). Neniu specifado estas farita pri kiom da diferencoj ekzistas inter malsamaj Ss-oj atingitaj fare de malsamaj unuopuloj, kvankam ĉi tiu problemo treege gravas kiam oni konsideras la signifon de tiu ĉi adverbo rilate al la t.n. Platona problemo pri lingvoakiro de infanoj. Ĉiel ajn ni notu, ke Ĉomsko subtenis la nocion, ke ekzistas individuaj diferencoj inter malsamaj Ss-oj posedataj de malsamaj homoj kaj sekve, implicite, la nocion ke parolantoj de iu aŭ alia lingvo povas ne posedi unuforman lingvoscion formale priskribitan de la genera gramatiko de Ĉomsko.

Ĉomsko prezentis la supran nocion, menciante trovaĵojn fare de *C. Chomsky* (1969) koncerne komprenadon de frazoj, kiuj enhavas kompleksajn frazstrukturojn kiel ekz. "*I asked him what to read*" („Mi demandis lin kion mi legu") kaj "*I told him what to read*" ("Mi diris al li kion li legu"). La aŭtorino montris, ke eĉ infanoj 10-jaraĝaj ne plene komprenas ĉi tiun specon

de frazoj. Ŝiaj trovaĵoj indikas, ke eĉ infanoj pli aĝaj ne plene atingas Ss-on de unuforma lingvoscio. Ili tial sugestas, ke la fina stato de lingvoscio malsamas inter malsamaj infanoj, se staras tie ĉi la aserto de *Crain & Pietroski* (2001, p. 139), ke "en nur kelke da jaroj, normalaj infanoj atingas stabilan staton de lingva kompetenteco."

Alia esploro, kiun Ĉomsko mencias en la diskuto, estas tiu de *Kramer, Koff & Luria* (1972). Tiu ĉi studo kontraŭas al la Ĉomska ideo de Ss, ĉar ĝi montras, ke ĉirkaŭ triono de la plenkreskuloj ne kapablas kompreni tiajn kompleksajn frazojn, kiaj estis testitaj fare de *C. Chomsky* (1969). Plue, la esploristoj trovis statistike signifan korelativecon inter la komprenado kaj kvociento de inteligenteco (angle *Intelligence Quotient:* IQ), tiel ke ju pli alta estas la kvociento de la testitoj, des pli bone ili analizis la strukturojn de tiaj ĉi frazoj.

Pozitivajn korelativecojn inter edukiteco kaj la kapablo analizi kompleksajn sintaksajn strukturojn demonstris aliaj studoj malnovaj (ekz. *Mills & Hemsley*, 1976) kaj pli novaj (ekz. *Karanth, Kudva & Vijayan*, 1996; *Dąbrowska*, 1997; *Chipere*, 2003). *Karanth* kaj kunaŭtoroj (1996) asertas, ke la gramatiko – Ss en tiu ĉi konteksto – posedata de homoj malpli edukitaj estas pli simpla kaj malpli abstrakta ol tiu posedata de homoj pli edukitaj. Aliaj du supraj esploristoj, *Dąbrowska* (1997) kaj *Chipere* (2003), estas konsciaj pri siaj studoj (koncerne aparte al la lingva teorio de Ĉomsko) kaj interpretas siajn trovaĵojn kontraŭ lia teorio.

Dąbrowska (1997) submetis kvin grupojn de testatoj malsamaj je edukiteco al la tasko analizi frazojn, kiuj estis sintakse kompleksaj kaj kiuj estis elprenitaj el „Lingvistika Esplorado" (*Linguistic Inquiry,* fakrevuo pri genera gramatiko). La trovaĵoj pri analizkapablo de sintaksaj strukturoj indikis grandan diferencon inter la kvin grupoj de testitoj. Ŝi tial asertas, ke la kapablo necesa por trakti tiajn frazojn ne ekzistas per si mem ene de la lingvokompetenteco de denaskaj parolantoj sed ĝi male estas kapablo, kiu evoluas en la daŭro de laŭfaka lernado. Tio ĉi signifas, ke denaskaj parolantoj ne posedas unuforman

lingvokompetentecon, precipe ĉar Ss antaŭ ĉio devas ebligi al ili analizi ankaŭ tiajn frazojn uzitajn en *Linguistic Inquiry*. Tute similaj trovaĵoj estas donitaj fare de *Chipere* (2003), kiu plue indikas, ke apartaj instruadoj plibonigas la kapablon analizi sintaksajn strukturojn de kompleksaj frazoj. Ĉiuj ĉi studoj montras, ke, kontraŭe al Ĉomsko, denaskaj parolantoj ne posedas unuforman Ss-on kaj ke inter ili troviĝas diferencoj neignorendaj rilate al atingitaj Ss-oj. Tio ĉi havas evidentan implicon pri lia fundamenta teorio – aparte koncerne al la Platona problemo pri lingvoakiro.

Ss kiel motivo postuli Platonan problemon

La Platona problemo de Ĉomsko koncernas kial infanoj povas atingi lingvoscion plenan de riĉeco, abstrakteco kaj kompleksecо surbaze de lingvosperto limigita kaj malriĉeca. *Nagata* (2005) asertis, ke la Platona problemo perdus sian fundamenton, se aŭ la lingvoscio aŭ la lingvosperto, aŭ ambaŭ, ne estas tiaj, kiaj ili estas karakterizitaj de Ĉomsko.

Nun la fakto sin malkaŝas, ke Ĉomsko akceptis la nocion, ke malsamaj parolantoj povas atingi diversajn Ss-ojn malsamajn je sintaksa kompleksecо. Se tiu ĉi ebleco estas efektiva, ties implicoj por psiĥolingvistiko kaj aliaj sciencaj branĉoj estas sendube grandegaj. Tio ĉi estas precipe pro tio, ke la Platona problemo (kaj ties deriva tezo de denaskismo) pri lingvoakiro staras surbaze de Ss, kiu antaŭ ĉio estu stabila kaj unuforma.

La Platona problemo starigas sin nur se ekzistas "granda malegaleco inter scio (Ss) kaj sperto (lingvosperto)" (*Chomsky*, 1968, p.78, interkrampaĵoj aldonitaj). Se Ss fariĝas malpli stabila kaj malpli unuforma ol ĝis nun supozite, tiam la malegaleco inter ili malgrandiĝos tiomgrade, ke malpli necesas postuli la universalan gramatikon (So), sekve la tezon de denaskismo pri lingvoakiro, por solvi la malegalecon.

Multaj subtenantoj de la Ĉomska teorio turnis kaj turnadas sian atenton ordinare al la stabila kaj unuforma aspekto de Ss, ne konsciante la alian nestabilan kaj neunuforman aspekton de

Ss. La du aspektoj ordinaraj videbliĝas ekz. en *Crain & Pietroski* (2001, p.147): "nur en kelke da jaroj [ĉiuj normalaj] infanoj atingas stabilan staton regatan de ekzakte tiuj principoj, kiujn spertaj lingvistoj kelkfoje distingas kiam ili esploras la gramatikojn de plenkreskuloj" (interkrampaĵoj aldonitaj konsidere de ilia priskribo en alia loko, p.146: "ĉiuj normalaj infanoj rapide atingas la stabilan staton").

Tiu ĉi situacio devenas antaŭ ĉio de iliaj esploradoj, kiuj estis kaj estas ofte faritaj surbaze de logikaj rezonadoj kontraŭe al empiriaj testadoj kaj falsadoj.[2]

Tamen ĉio ĉi estis ne alia eĉ pri esploristoj, kiuj kontraŭas la teorion de Ĉomsko. Ankaŭ ili emis konsideri en siaj diskutoj nur la unuan ordinaran aspekton de Ss prezentita de *Chomsky* (1967, 1968), ekz. "kvankam malsamaj je la nivelo de inteligenteco..., la diversaj infanoj en lingva komunumo ĉiuj akiras esence la saman lingvon kiel la aliaj kaj la saman lingvon kiun parolas iliaj pliaĝuloj" (*Sampson*, 2005, p. 32) aŭ, pli eksplicite, "malsamaj gradoj de inteligenteco ne influas la lingvoakiradon, kaj sekve inteligenteco mem ne rilatas al la akirado de lingvo" (*Steinberg, Nagata & Aline*, 2001, p. 302).

Tiaj ĉi interpretoj ne ŝajnas eraraj, ĉar fundamenta vidpunkto akcentita fare de *Chomsky* (1986) estas trafa en tio, ke ĉiuj denaskaj parolantoj normalaj atingas la finan staton de lingvoscio, kvankam relative stabilan, kaj ke Ss intencita de li preskaŭ ĉiam celas pli al stabileco kaj unuformeco ol al nestabileco kaj neunuformeco.

Sendube estas, ke, se pli da atento estus turnita al tiu ĉi nekonscia aspekto de Ss, kaj se Ĉomsko estus doninta pli specifan priskribon pri la reala stato de Ss, tiam estus malpli okazinta tiom viglaj debatoj pri la denaskismo pri lingvoakiro kiel ni nun vidas diversloke (ekz. ĉe *Pinker*, 1994; *Sampson*, 2002, 2005; *Cowie*, 1999; *Crain & Pietroski*, 2001, 2002; *Pullum & Scholz*, 2002; *Fodor & Crowther*, 2002; *Lasnik & Uriagereka*, 2002; *Leate & Yang*, 2002; *Scholz & Pullum*, 2002).

Ss kiel kompetenteco ne submetebla al influoj de edukiteco kaj inteligenteco

Kiel supre diskutite, Ss entenas en si du aspektojn, kiuj staras kontraŭ si reciproke, nome: aspekton stabilan kaj unuforman kontraŭ aspekto nestabila kaj neunuforma. Tamen eblus alia interpreto de Ĉomsko kaj ties subtenantoj ol ĉe nia flanko. Tiu interpreto insistas, ke edukiteco kaj inteligenteco rilatas ne al Ss kiel lingvoscio (angle *knowledge of language*) sed al Ss kiel lingvokapablo (angle *ability of language*). Tiu ĉi distingo ankaŭ estas la distingo, kvankam iom malnova, inter kompetenteco (angle *competence*) kaj plenumado (angle *performance*). Kompetenteco estas lingvoscio kiun posedas denaskaj parolantoj, sed kies enhavon ili ne kapablas esprimi per vortoj, dum plenumado estas lingva produktaĵo de kompetenteco, nome: tio, kion parolas aŭ komprenas aktuale denaskaj parolantoj. Ss kiel kompetenteco ĝis nun pritraktita en tiu ĉi artikolo, denove, enhavas la generan gramatikon de Ĉomsko kaj, kiel klare skribite en *Chomsky* (1965, 1986), estas uzata aktuale en iuj aŭ aliaj plenumadoj de lingvo.

Du rimarkigojn ni devas doni ĉi tie por gajni pravan rilaton inter kompetenteco kaj plenumado. Unue, ni devas diri, ke la rilato inter kompetenteco kaj plenumado renversiĝas en la esplormaniero de Ĉomsko kaj subtenantoj. Nome, ili antaŭmetas kompetentecon antaŭ plenumado, tute kontraŭe al la rezonado de ordinara empiria scienco. La empiria scienco plej ofte postulas hipoteze apartan teorian estaĵon (angle *theoretical construct*) sed tamen, tio ĉi estas nur kiam oni devas klarigi iun aŭ alian realan plenumadon kaj ne disponeblas specifa estaĵo (aŭ reala aŭ teoria) por ties plenumado. Tute renversiĝas tiu ĉi rezonado ĉe Ĉomsko tiel, ke hipoteza estaĵo antaŭiras realan plenumadon. Tion ĉi oni vidas plej klare en *Crain & Thornton* (1998, p.5): "lingva teorio (t.e. la genera gramatiko) estas 'pura' kaj ... datumoj pri plenumado estas 'malpuraj'." Alifraze, diversspecaj datumoj ne pure spegulas en si la lingvan teorion pro diversspecaj faktoroj, kiuj altrudas aktualajn plenumadojn. Sekve, se hipotezoj prognozitaj laŭ lingva teorio ne

estus observitaj, tiam tiaj rezultoj estas interpretitaj tiamaniere, ke diversspecaj faktoroj nespecifitaj malhelpis la aperadon de tiuj plurformaj lingvaj teorioj (vd. *Chomsky*, 1965; *Newmeyer*, 1983; *Chien & Wexler*, 1990; *Grimshaw & Rosen*, 1990; *Epstein, Flynn & Martohardjono*, 1996; *Smith*, 1999). Tiu ĉi rezonado ne povas ne alfronti kritikon tiel satiran, ke "se Ĉomsko estas erara [se antaŭdiri plenumadon fare de infanoj], riproĉu la infanojn anstataŭ Ĉomskon" (*Itkonen*, 1996, p. 493, interkrampaĵoj aldonitaj). Tiu ĉi renversiĝo devenas ekzakte de la fakto, ke Ĉomsko faris filozofian turniĝon de formalisto al mensisto kaj realisto, kaj tiam lasis sian generan gramatikon kiel mensan ekvivalenton, kiu estas akirita, posedata kaj utilizata fare de denaskaj parolantoj (vd. *Nagata*, 2005, pri la turniĝo kaj ties implicoj). La teorio de genera gramatiko superas ties plenumadon, ne inverse (vd. *Chomksy*, 1986).

Due, kvankam kompetenteco kaj plenumado distingeblas teorie, ili tamen ne diferencas inter si reciproke, se rigardataj el la vidpunkto de empiria kaj konkreta esplorado. Kompetenteco estas, antaŭ ĉio, mensa ekvivalento de la Ĉomska genera gramatiko, kiu siavice estas produktaĵo kiun Ĉomsko konstruis per teoria sed aktuala kaj konkreta plenumado analizi sintaksajn strukturojn de iuj aŭ aliaj frazoj. Sekve, kompetenteco estas nur unu speco de plenumado okazanta ene de Ĉomsko mem, neniom malsama je speco al plenumado, kiun montras ordinaraj parolantoj kiam ili aktuale produktas kaj komprenas frazojn. Ne gravas tie ĉi kiom da diferenco ekzistas pri abstrakteco inter plenumado fare de ordinaraj parolantoj kaj plenumado fare de Ĉomsko.

Pri ambaŭ plenumadoj nepras samspecaj mensaj prilaboradoj kaj tiujn ĉi utiligas sendube ambaŭ plenumadoj.[3] Absurda do estas la aserto, ke Ĉomsko kaj aliaj samskolanoj pritraktas ne plenumadon sed kompetentecon, dum ili samtempe engaĝas sin tute en plenumado gramatikumi sintaksajn strukturojn de diversspecaj frazoj. Kompetenteco nek antaŭiras nek superas plenumadon: ĝi anstataŭe postiras la plenumadon. Tio ĉi estas pro tio, ke kompetenteco estas, el la vidpunkto de empiria sci-

enco, hipoteze postulita teoria estaĵo kaj ĝi estas ĉiam tuj reviziebla se evidentiĝas ties eraro.

Se la supra diskuto staras bonorde, tiam ne validas la kritiko, ke estas Ss kiel kompetenteco, kiun Ĉomsko celis en la jaroj ekde 1979. Kompetenteco kaj plenumado ne diferenciĝas unu de la alia, se oni rigardas ilin el empiria vidpunkto, konsiderante la psiĥologian procezon kiu ja estas je la bazo de ambaŭ.

Konklude

La fina konstanta stato (Ss) starigita de Ĉomsko kiel la lingvoscio atingita de ĉiuj denaskaj parolantoj estas plejofte karakterizita kiel stabila kaj unuforma. Tamen estas fakto, ke Ĉomsko efektive akceptis alian aspekton de Ss, kiu statas nek stabila nek unuforma en la senco, ke Ss malsamas inter parolantoj malsamaj je edukiteco kaj inteligenteco. Fakte montris tiun ĉi aspekton de Ss kelkaj studoj pri komprenado de frazoj sintakse kompleksaj. Tamen multaj esploristoj ne konsciis nek konscias tiun ĉi alian aspekton de Ss, tial kaŭzinte ĝis nun kaj kaŭzante eĉ nuntempe viglajn debatojn pri denaskismo de lingvoakiro. Se tiu ĉi alia aspekto de Ss estas bone konsiderita, ĝi plenumos grandan rolon malfortigi la Ĉomskan tezon de denaskismo pri lingvoakiro.

Notoj

(1) Tiun ĉi mencion la aŭtoro lernis pere de *Chipere* (2001, p. 68). Li rilatis ĝin al individuaj diferencoj je sintaksa kompetenteco: tamen tiu ĉi artikolo diskutas ĝin rilate al la Ĉomska konceptado de la fina konstanta stato kaj al lia denaskismo pri lingvoakiro.

(2) Similan konstaton prezentas *Bunke* (1984), *Itkonen* (1996) kaj *Sampson* (2005).

(3) Tiun ĉi vidpunkton ni prezentis aliloke (*Nagata*, 1988, 2001, 2004) kaj tute la samon esprimis multe pli antaŭe aliaj esploristoj kiel *Bever* (1970), *Matthews* (1979) kaj *Osgood* (1980).)

Referencoj

Beve T. G. (1970).*The cognitive basis for linguistic structures.* En *J.R..Hayes(Red.), Cognition and the development of language* (pp. 279-362). *New York: Wiley.*

Bunke M.(1984). *Philosophical problems in linguistics. Erkenntnis,* 21, 107-173.

Chien Y-C. & Wexler K.(1990). *Children's knowledge of locality conditions in binding as evidence for the modularity of syntax and pragmatics. Language Acquisition, 1, 225-295.*

Chipere N. (2003). *Understanding complex sentences: native speaker variation in syntactic competence. Hampshire: Palgrave MacMillan.*

Chomsky C.(1969). *The acquisition of syntax in children from 5 to 10. Cambridge, MA: MIT Press.*

Chomsky N. (1965). *Aspects of the theory of syntax. Cambridge, MA: MIT Press.*

Chomsky N. (1967). *Recent contributions to the theory of innate ideas. Synthese,*17, 2-11

Chomsky N. (1968). *Language and mind. New York: Harcourt Brace Jovanovich.*

Chomsky N.(1980). *On cognitive structures and their development: a reply to Piaget.* En *M. Piatteli-Palmarini, M. (Red.), Language and learning: the debate between Jean Piaget and Noam Chomsky (pp. 35-54). Cambridge, MA: Harvard University Press.*

Chomsky N. (1986). *Knowledge of language: its nature, origin and use. New York: Praeger.*

Cowie F. (1999). *What's within? Nativism reconsidered. Oxford: Oxford University Press.*

Crain S. & Pietroski P. (2001). *Nature, nurture and universal grammar. Linguistics and Philosophy,* 24, 139-186.

Crain S.& Pietroski P. (2002). *Why language acquisition is a snap. Linguistic Review,* 19, 163-183.

Crain S. & Thornton R. (1998). *Investigations in universal grammar: a guide to experiments on the acquisition of syntax and semantics. Cambridge, MA: MIT Press.*

Dąbrowska E. (1997). *The LAD goes to school: a cautionary tale for nativists. Linguistics,* 35, 735-766.

Epstein S.D., Flynn S. & Martohardjono G. (1996). *Second language acquisition: theoretical and experimental issues in contemporary research. Behavioral and Brain Sciences,* 19, 677-758.

Fodor J.D. & Crowther C. (2002). *Understanding stimulus poverty arguments. Linguistic Review,* 19, 105-145.

Grimshaw J. & Rosen S.T. (1990). *Knowledge and obedience: the developmental status of the binding theory. Linguistic Inquiry,* 21, 187-222.

Itkonen E. (1996). *Concerning the generative paradigm. Journal of Pragmatics,* 25, 471-501.

Karanth P., Kudva A. & Vijayan A. (1996). *Literacy and linguistic awareness.* En *B. de Gelder & J. Morais (Red.), Speech and reading: a comparative approach* (pp. 303-316). *London: Lawrence Erlbaum.*

Kramer P.E., Koff E. & Luria Z. (1972). *The development of competence in an exceptional language structure in older children and young adults. Child Development,* 43, 121-130.

Lasnik H. & Uriagereka U. (2002). *On the poverty of the challenge. Linguistic Review,* 19, 147-150

Legate J.A.& Yang C.D. (2002). *Empirical re-assessment of stimulus poverty arguments. Linguistic Review,* 19, 151-162.

Mills J.A. & Hemsley G.D. (1976). *The effect of level of education on judgments of grammatical acceptability. Language and Speech,* 19, 324-342.
Nagata H. (1988). *The relativity of linguistic intuition: the effect of repetition on grammatical judgments. Journal of Psycholinguistic Research,* 17, 1-17.
Nagata H. (2001). *Judgments of grammaticality of Japanese bitransitive sentences with a differing number of arguments. Perceptual and Motor Skills*, 92, 997-1005.
Nagata H. (2004). *Faulty Japanese sentences are judged more grammatical when punctuation is used: negative implications for Chomsky's principle of Full Interpretation. Perceptual and Motor Skills*, 99, 325-336.
Nagata H. (2005). Deveno de denaskismo pri lingvoakiro de *Chomsky*. Scienca Revuo, 56, 81-86.
Newmeyer F.J. (1983). *Grammatical theory: its limits and its possibilities. Chicago, IL: Univer. of Chicago Press.*
Osgood C.E. (1980). *Lectures on language performance. New York: Springer-Verlag.*
Piatteli-Palmarini M. (1979). *Théories du langage, théories de l'apprentissage: le débat entre Jean Piaget et Noam Chomsky. Paris: Seuil.* [*Language and learning: the debate between Jean Piaget and Noam Chomsky. Cambridge, MA: Harvard University Press.* (1980).]
Pinker S. (1994). *The language instinct. London: Penguin Books.*
Pullum G.K. & Scholz B.C. (2002). *Empirical assessment of stimulus poverty arguments. Linguistic Review,* 19, 9-50.
Sampson G. (2002). *Exploring the richness of the stimulus. Linguistic Review,* 19, 73-104.
Sampson G. (2005). *The 'language instinct' debate. Revised ed. London: Continuum*
Scholz B.C. & Pullum G.K. (2002). *Searching for arguments to support linguistic nativism. Linguistisc Review*, 19, 185-223.
Smith N. (1999). *Chomsky: ideas and ideals. Cambridge, UK: Cambridge University Press.*
Steinberg D.D., Nagata H. & Aline D. (2001). *Psycholinguistics: language, mind and world. 2nd ed. Essex, UK: Pearson Education.*

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA
Department of Clinical Psychology
Kawasaki University of Medical Welfare
288 Matsushima, Kurashiki 701-0193
JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvoscio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Ovoj

Ralph A. Lewin

Pasko estas la tradicia festo de printempo, almenaŭ en la norda hemisfero, sezono de renoviĝo kiam bestoj naskas idojn kaj birdoj konstruas nestojn kaj demetas ovojn.

Tial, ĉe la plej multaj gentoj, la printempon simbolas la ovo – senpeka, simpla ovo. Senpeka sendube, sed simpla? Ĉu vere?

Jen la temo de tiu ĉi kontribuo, kiu temas ne pri la buntaj ovoformaj dolĉaĵoj de Pasko, kutime fabrikataj el ĉokolado, foje tute malplenaj, sed kelkfoje plenigitaj per iu ajn glueca dolĉaĵo multe ŝatata de infanoj (kaj eble ankaŭ de la dentistoj).

Enkonduko

Tiu ĉi artikolo temas pri naturaj ovoj kiujn produktas bestoj multspecaj. Ankaŭ multaj plantoj, inkluzive de algoj, filikoj kaj muŝoj, reproduktiĝas per ovoj kaj ne per semoj. Sed pri tiaj aferoj devus temi alia artikolo.

Jen kelkaj interesaj priovaj faktoj:

- Oni povas faligi nekuiritan ovon de alteco de du metroj sur betonan surfacon sen ke ĝi rompiĝus!
- Kelkfoje iun fekundigitan ovon oni povas vendi, je kosto de pli ol mil dolaroj!
- Kelkaj ovoj restas ankoraŭ vivaj post konserviĝado dum pli ol tricent jaroj!

Ĉu vere? Jes, sed kompreneble tiuokaze ne temas pri la bone konataj ovoj de kokinoj. Tiuj de ranoj, de homoj, de iuj plank-